

Eŭropa Bulteno

Septembro 2018, Numero 184

MULTLINGVA AKCELILO MARŜAS LONGPAŜE



La 20-an kaj la 21-an de septembro okazis la dua labora konferenco de ĉiuj partneroj en la projekto Multlingva Akcelilo financata de Eŭropa Unio. Ĝi okazis en Bratislavo (Slovakio) kun partopreno de 15 reprezentantoj el 6 landoj. Kiel ni jam raportis, la projekton decidis financi fondaĵo de Eŭropa Komisiono Erasmus+ per 250.000 eŭroj. La celo de tiu ĉi projekto estas krei didaktikajn rimedojn por nova lerneja lernobjekto kiu dum unu jaro estus instruata al 9-jaraj infanoj en eŭropaj elementaj lernejoj. Tiu lernobjekto celas evoluigi en infanoj apartan konscion pri lingvoj ĝenerale kiu grave plirapidigos iliajn postajn lernadojn de fremdlingvoj. La projekto startis en novembro 2017 kaj finiĝos en decembro 2019, kiam la diadaktikaĵoj devos esti je dispono por ĉiuj elementaj lernejoj en EU. La Multlingva Akcelilo, 64-hora instruobjekto, baziĝas je tre elementa Esperanto.

La projekto havas 2 revoluciajn tute novajn celojn kaj aspektojn: Oni kreas lernobjekton per kiu infanoj kaj gepatroj ĝue kaj lude eniras la esencon de lingvoj. La unua revolucia aspekto estas ke la lernobjekton instruos lingvoinstruistoj kiuj neniam antaŭe lernis Esperanton. La dua revolucia aspekto estas ke oni ne instruos Esperanton kiel tutecan lingvon, sed nur minimumon uzatan en praktiko (el 200 morfemoj) kiu tamen ebligas ke la infanoj la lingvon ekparolu ĉar temas pri la plej oftaj elementoj uzataj.

Por ke oni atingu la veran celon ke la infanoj kiuj ankoraŭ konas nenion pri gramatiko, akiru rapidigitan kapablon lerni fremdlingvon oni devas post unujara lernado atingi ke ili tiom regu praktikan uzon de la lingvo ke ĝi kreu en ili klaran komprenon pri gramatikaj strukturoj ĝenerale kaj disponigu iom pli ol 100 vortojn kiuj ĉefe venas el la latina fonto kaj helpas lerni aliajn eŭropajn lingvojn kun forta latina fono kiel la angla kaj romanidaj lingvoj. Do diference de aliaj didaktikoj kiuj instruas grandajn kvantojn da materialo (inter 1000 kaj 2000 vortoj kaj preskaŭ la tutan gramatikon, kaj kiuj kutime atingas rezultojn nur pri pasiva lingva kono, sed ne povas atingi paroladon de la lingvo dum nur unu jaro (2 lernohoroj semajne), la Multlingva Akcelilo ovoluigas diadaktikajn rimedojn por preskaŭ nura instruado de parolkapablo. Ambicio ĝis nun neniam atingita.

La unua fazo de la projekto estis testi la evoluintajn materialojn dum du monatoj al infanoj en tri elementaj lernejoj de tri landoj. La celo estas konstati kiom tiuj novaj materialoj estas efikaj kaj ĉu per ili vere eblos atingi parolkapablon dum unu jaro al relative grandaj lernantogrupoj (meze 14).



La septembra kunsido ĉefe analizis la rezultojn de tiu testa instruado kiu okazis de aprilo ĝis junio 2018 en Zagrebo (Kroatio), Ŝentilj (Slovenio) kaj Vraca (Bulgario). En la tri kursoj 5 lingvoinstruistinoj (3 el ili de la angla) instruis al 40 infanoj.

La baza konstato estas ke la kurson kun entuziasmo akceptis ĉiuj gelernantoj kaj ĉiuj iliaj gepatroj kaj la instruistoj kiuj lernis elementojn de Esperanto paralele kun la infanoj. Ĉiuj opinias tion la ĉefa atingiĝo, tiel ke eĉ se en la fina fazo oni ne sukcesus atingi parolkapablon de ĉiuj infanoj, oni atingis entuzisamon por tiu lingvo kaj deziron plulerni ĝin. (Laŭ la projektplano neniu lernejo devas plu daŭrigi la kurson post la testfazo, sed ĉiuj faros tion pro la deziro de ĉiuj 3 grupoj (instruistoj, infanoj kaj iliaj gepatroj).



Dum la kunsido oni akceptis diversajn ŝanĝojn en la didaktikaĵoj baze de rimarkoj de la geinstruistoj (ĉiuj 5 ĉeestis en Bratislavo) kaj tiel fiksis definitive la modelon de la didaktikaĵoj por la tuta kurso kaj la partneroj en la dua fazo finproduktos didaktikajn rimedojn ĝis la jarfino 2018 por la tuta kurso. La kursoj estos daŭrigataj paralele kun la evoluado de la didaktikaĵoj kaj komplete finiĝos en majo 2019. La tria fazo estos ellaboro de detala platformo kun instrukcioj kiel uzi tiujn didaktikaĵojn (aplikante la plej modernajn informadikajn rimedojn) en 6

lingvoj de la partneroj. Fine de la sekva jaro troviĝos je dispono granda portalo kun tiuj materialoj kaj priskribo de la lernobjekto kaj la portalon povos uzi kaj la geinstruistoj kaj la infanoj.

Estas tre multaj interesaj elementoj de tiuj didaktikaĵoj pri kio ni skribos alifoje.

Zlatko Tišljar

LA 85-A ITALA KONGRESO DE ESPERANTO EN SAN MARINO (18-25.08 2018)

Ĉi-foje la Itala Kongreso okazis ekster Italio, sed ĉirkaŭata de la teritorio de Italio en unu el la plej malnovaj ekzistantaj respublikoj de la mondo en San Marino, kiu troviĝas tute proksime al la konata riviero *Rimini*. Ĝi estis fondita jam en la jaro 301. Sur la kresto de la monto Titano leviĝas la tri fortikaĵoj videblaj jam de malproksime. Ni estis bonŝancaj kongresi en ĝia ĉefurbo San Marino. La kongreso fariĝis eksterordinara pro bonaj rilatoj kaj helpemo de la estroj de la Respubliko. La evento okazis en la prestiĝa kongresa centro *Kursaal*. Aliĝis 183 kongresanoj el 29 landoj, tamen kelkaj ne povis veni pro diversaj kialoj.

Sabate la 18-an de aŭgusto, post la alveno de la partoprenantoj, okazis Interkona vespero kun muziko kaj orientaj dancoj kaj la prezento de la dumsemajnaj ekskursoj fare de Paola Nigrelli. La dimanĉan solenan inaŭguron prezidis Michela Lipari prezentante podianojn, inter kiuj ĉeestis gravaj gastoj. S-ino Fausta Morganti la eksa ministrino pri kulturo de San Marino kaj la dumviva reprezentanto de San Marino ĉe OSCE (Organizo por Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo) en Vieno. Bonvenigis nin ankaŭ la itala ambasodoro en San Marino s-ro Guido Cerboni. Poste Javier Alcalde prezentis la kongresan temon "Malgrandaj komunumoj, grandaj valoroj". (Dum la semajno okazis seminario pri tiu temo kun viglaj diskutoj). Sekvis bonvenigaj vortoj kaj salutoj de kelkaj aliaj Esperanto-organizaĵoj (Junularo, KELI, ILEI, IFEF, LIBE), kaj po unu saluto el ĉiu kontinento. Poste la kursgvidantoj invitis la ĉeestantojn al siaj respektivaj Esperanto-kursoj. Amri Wandel prezentis la 35-an Sanmarinecan Universitatan Sesion (SUS 35) de AIS (Akademio Internacia de Sciencoj) fondita ĝuste en San Marino. Temis pri prelegoj: "Vivo ekster-tera" prezentata de Amri mem, "Shakespeare kaj Hamlet" prezentata de Humphrey Tonkin, "Ĝenerala lingvistiko" prezentata de David Astori kaj "Bioenergetiko de la homa organismo" prezentata de Eva Boyadjieva.



En la enirhalo estis instalita ekspozicio pri Marina Michelotti, kiu en San Marino, fondis grupon kaj multe laboris por Esperanto. Alia ekspozicio pri Esperanto kaj pri la aŭtoro de la lingvo L.L. Zamenhof troviĝis en la unua etaĝo. Enhavoriĉa estis la libroservo, kie okazadis libroprezentadoj de diversaj aŭtoroj: Michela Lipari, Carlo Minnaja, Paola Tosato, Humphrey Tonkin. Al interesatoj pri filatelio estis proponata poŝta stampo kaj poŝtkartoj de San Marino jam pretaj por forsendo.

Inter interesaj prelegoj estis tiu pri "Aliaj planlingvoj kaj aliaj grandaj valoroj", "Unu lingvo por ĉiuj, al ĉiu la propra lingvo", "Bona Espero en Brazilo", "Religiaj objektoj de naciaj minoritatoj en Bosnio kaj Hercegovino" " La fundamento de novbabelismo", "Enigmoj en Esperanto", "Rolo de Esperanto dum la hispana civila milito".

Kadre de la kongreso kunvenis la itala sekcio de ILEI, Asembleo de la itala instituto de Esperanto kaj ankaŭ gejunuloj havis sian propran programon plejparte vesperan kaj amuzan. Vendrede Elda Doerfer kun Michela Lipari prezentis la venontjaran Italan Kongreson, kiu okazos en la urbo Triesto de la 24-a de aŭgusto ĝis la 31-a aŭgusto. Do, vi ĉiuj estas bonvenaj. Poste okazis resumo de la laboroj de la seminarioj, de AIS kaj de E-kursoj.

Neforgesebla travivaĵo estis invito al la itala ambasadejo, kie ni aŭskultis en belega ĝardeno klasik-muzikan koncerton de fluta kvaropo *Renaissance* kaj poste ni estis invititaj al festeno kun ŝaŭmvino, fruktoj kaj glaciaĵo.



Tre alloga estis la oferto de ekskursoj. La partoprenantoj povis ekkoni la urbon San Marino, ties unuan turon kaj promeni en pitoreskaj stratoj. En aliaj ekskursoj oni povis vidi la tutan Italion en miniaturoj, viziti urbojn Rimini, Santarcangelo di Romagna, San Leo, Cesena kaj Cervia, Urbino kaj Gradara, Ravenna. Tre interesa estis la Internacia muzeo pri ceramikaĵoj en Faenza, kie ni povis mem krei originalan vazon. En la muzeo de metiejoj ni ekkonis la historion de San Marino kaj la tiaman kamparanan vivon. Poste ni spertiĝis en preparado

kaj bakado de speciala plata pano.

Dum vesperaj programeroj regalis nin per muziko JoMo en publika parko, poste sekvis trinkmanĝa nokto. En aliaj vesperoj tie prezentiĝis italaj kantistinoj Grazia Barboni kaj Chiara Raggi, kiuj ricevis merititan aplaŭdon. En la salono de Grand Hotel Mario Migliucci prezentis teatran spektaklon "Unua rigardo". La lastan vesperon tie prezentiĝis la duopo Evocaré - Patrizia Bossoni, kiu recitis poemojn en Esperanto kaj Giuseppe Serafino akompanis ŝin per piano. Ĉe la fino oni premiis fotojn el la fotokonkurso lanĉita de la gejunuloj. Tiel finiĝis la 85-a Itala Kongreso de Esperanto.



La ĉi-jara kongreso estis vere elstara kaj bonege organizita. Riĉa propono de altkvalitaj prelegoj, en kiu ĉiu povis elekti ion interesan por sia gusto, laŭ la titolo de la prelego aŭ laŭ la preleganto. Dankegon al la organizintoj de la Itala Esperanto-Federacio, kiuj sub la gvido de Michela Lipari preparis neforgeseblan kulturen kaj turisman programon dum tiu ĉi memorinda kongreso.

Liba Gabalda

15-a RENKONTIĜO DE ESPERANTO-VERKISTOJ EN KROATIO



En malgranda nordkroata vilaĝo Hraĉĉina okazis la 15-a renkontiĝo de E-verkistoj kiun nome de Kroata E-Ligo organizis Spomenka Ŝtimec. Ŝi persiste faras tiun laboron jam preskaŭ du jardekojn kun minimumaj subvencioj. Ŝajne ke la sekva renkontiĝo ne okazos, ĉar laŭ la nuna stato la renkontiĝo ne plu estos financata.

La renkontiĝo okazis inter la 14-a kaj 16-a de septembro kaj la centra programo okazis la 15-



an de septembro. La ĉefa gasto estis Mikaelo Bronstein el Rusio, kiu prezentis sian plej novan libron: *Mi stelojn jungis al revad'*. Li parolis pri sia laboro kaj la libro kaj oni legis plurajn eliraĵojn. Spomenka Ŝtimec prezentis noveldonitan itallingvan tradukon de ŝia libro *Ombro* sur interna pejzaĝo kaj du muzikstudentoj Nenad Sinkhaus kaj Josip Konfić prezentis tre plaĉan koncerton de perkutinstrumentoj. Fine Mikaelo Bronstein koncertis kantante siajn kantojn akompane je gitaro.

Ĉeestis 40-o da esperantistoj, ĉefe el Kroatio.

Zlatko Tišljarić

SAT KONGRESO EN KRAGUJEVAC – SERBIO



La 91-a Kongreso de SAT okazis inter la 5-a kaj 12-a de aŭgusto 2018 en Kragujevac, Serbio. La ĉeftemo, Esperanto kaj transnacia komunikado en la inform-teknologia epoko, difinis ne striktan kadron de bunta prelega programo kaj debatoj, kiuj reflektis interesojn de SAT kaj ĝia publiko. Aliĝis 85 esperantistoj el 15 landoj de ĉiuj kontinentoj, el kiuj iom pli ol 70 vere partoprenis. Dek kvin kongresanoj partoprenis ankaŭ la

tritagana postkongresana ekskurso Laŭ vojoj de historio kaj vino por renkontiĝi kun famaj vinproduktejoj kaj prahistoriaj, Romiaj, mezepokaj kaj novepokaj historiaj lokoj sur la teritorio de Serbio.

La kongresa slogano, Esperanto: kultura ponto inter Kragujevac kaj la mondo, estis direktita unuavice al la neesperantista medio, en kiu la kongreso rimarkeble eĥiĝis, des pli ĉar ĝi siamaniere omaĝis la 200-jariĝon de la moderna ŝtato de Serbio kaj Kragujevac kiel ĝia unua ĉefurbo. La solenan malfermon ĉeestis kaj la kongreson salutis prezidanto de la urba parlamento de Kragujevac kaj reprezentanto de la serbia Ministerio pri eksteraj aferoj. Pri la kongreso raportis po tri fojojn Radio-Televido de Serbio kaj la loka Radio-Televido de Kragujevac, plujfore aperis raportoj kaj intervjuoj en tutŝtataj kaj lokaj gazetoj kaj en la programo de Serba Scienca Televido. La kongreso lasas pli daŭran informan sporon ankaŭ en la formo de DVD-filmo.

Akorde kun la kongresa slogano, la kulturarta kaj turisma programo pontis al la internacia publiko kulturon de Serbio kaj, inverse, alportis en la kulturan medion de Kragujevac E-kulturajn spirojn el diversaj partoj de la mondo, kio estis emfazita en raportoj de amaskomunikiloj.

Ĉio ĉi revekis la intereson pri Esperanto en Kragujevac kaj pli vaste en Serbio kuraĝigante la esperojn pri revigligo de la loka kaj regiona E-movado. La ŝancojn por tio plifortigos la venontjara 52-a Kongreso de ILEI okazonta en alia serbia urbo Ĉaĉak inter la 13-a kaj 20-a de julio 2019.

Radojica Petrović

EŬROPA KONFERENCO DE EEU EN AŬGUSTO 2019 EN TRIESTO

EEU estraro interkonsentis kun Itala Esperanto Federacio ke ĝi okazigos sian Eŭropan Konferencon en 2019 kadre de la 86-a Itala E-kongreso en Triesto inter la 24-a kaj 28-a de aŭgusto 2019. La temo de la konferenco estos: Multlingva politiko de EU en lernejoj. Dum tiu ĉi konferenco ni povos prezenti interalie la finajn rezultojn de granda poresperanta projekto financata de EU „Multlingva Akcelilo“ kaj havos konkretan proponon por EU en eduka sektoro kiel esence plibonigi lernadon de fremdlingvoj kaj tiel serioze kontribui al realigo de la proklamita celo de EU – klopodi evoluigi multlingvecon. Dum la konferenco prelegos 5 prelegantoj inter kiuj d-ro Vytenis Andriukaitis, nuna komisionano de Eŭropa Komisiono, kaj ni klopodos partoprenigi ankaŭ komisionanon por lernejoj aferoj de EU-komisiono, sinjoron Navracsics.

Dum tiu ĉi periodo ni planas ankaŭ kutimajn kunsidojn de la asembleo de EEU (Malferman por kiu ajn interesita kongresano kaj internan nur por EEU-sembleanoj. Ankaŭ Estrarkonsido okazos kaj aparta konsulta kunsido inter la EEU-estraro kaj d-ro Andriukaitis pri tio kiel agi por interesi la edukan konsilion de EU pri la lernobjekto Multlingva Akcelilo. La estraro de EEU invitas ĉiujn asembleanojn de EEU aliĝi al la Itala kongreso (per elektronika aliĝilo) antaŭ la fino de januaro por pagi minimuman kotizon (35 eŭrojn) kaj por ke ni ĝustatempe sciu, ĉu ni havos kvorumon.

Seán Ó Riain

86-A ITALA KONGRESO DE ESPERANTO EN TRIESTO



Ĝi okazos inter la 24-a kaj 31-a de aŭgusto 2019. Plurtagaj seminarioj, gvidataj de kompetentaj fakuloj, estas la ĉefelementoj de la programo karakterizanta la italajn kongresojn. La kongresa temo estos: “Multkulturismo kaj plurlingvismo hodiaŭ”, kiu estos pritraktata per prelegoj kaj ene diskutgrupoj. Kompletigos la programon prelegoj kunlabore kun kongresanoj el pluraj landoj, kiuj estas invititaj jam de nun al propono de interesaj temoj. La prelegantoj rajtos aliĝi senpage al la kongreso. Krome

okazos diversnivela lingvokurso kaj prezentado de la novaj eldonaĵoj aĉeteblaj ĉe la libroservo.

Kio ankoraŭ? Ekspozicioj pri Esperanto kaj L. L.Zamenhof, koncertoj, spektakloj, diversaj itineroj tra la urbo kaj ties ĉirkaŭaĵoj, plus ekskursoj en Friulo Juli-Venetio.
kongreso@esperanto.it

KOTIZOJ:	Rabatita kotizo:	Plena:
1a periodo (ĝis la 31a de januaro 2019)	35,00	70
2a periodo (ĝis la 31a de majo 2019)	45,00	90
3a periodo (ĝis la 31a de julio 2019)	55,00	110
4a periodo (aŭguste)	60,00	120

LKK de la Kongreso

STATISTIKOJ PRI LINGVOJ EN EŬROPO

Okaze de la ĉi-jara Eŭropa tago de lingvoj (la 26-a de septembro) la Konsilio de Eŭropo aperigis informojn pri statistikoj pri lingvoj en Eŭropo. Inter la datumoj estas la jenaj: 65% de eŭropanoj parolas minimume unu fremdlingvon. Unuan pozicion tiusence havas Svedio kun 97%, sekvas Latvio, Danlando kaj Litovio kun 96%, Luksemburgo (95%), Finnlando kaj Malto kun 92% kaj Estonio kun 91%.

Britio estas en la lasta pozicio kie 65% parolas neniun lingvon, Antaŭlasta estas Rumanio kie 64% parolas neniun fremdlingvon, en Bosnio kaj Hercegovino tiu procento estas 61%, en Albanio 60% kaj en Hungario 58%.

Kompreneble tiu statistiko estas duba ĉar ja temas pri enketo en kiu la civitanoj mem decidas kiom da fremdlingvoj ili konas kaj kutime tio estas troigitaj ciferoj, aparte konsiderante ke individuoj tre subjektive taksas sian scion.

Se oni rigardas la plej altajn ciferojn, ŝajnas al mi ke nur la skandinavoj vere estas rekorduloj dank' al ilia lerneja sistemo kaj riĉeco, sed aliaj profitis de iamaj mastroj kiuj regis ilin. Baltaj landoj havas altajn ciferojn ĉar ili bone parolas la rusan kiun ili devis lerni en la tempo de Sovetunio kaj ĉar ankoraŭ tie vivas multaj rusoj. Slovenio estas rekordulo kun homoj kiuj parolas tri aŭ pli da lingvoj dank' al tio ke ili turismas ofte al Kroatio kaj konas la kroatan, multaj konas la najbaran germanan kaj ili diligente lernas ne nur en lernejoj la anglan. Simpla konstato: Tiuj kiuj havis dum longa periodo mastrojn, tiuj profitis de tio, almenaŭ lingve.

Zlatko Tišljarić

LA SESA PARTO EL LA LIBRO »IDENTECOJ« EŬROPA IDENTECO

Novaj grupoj konstante naskiĝas kaj malnovaj mortadas. Grandaj organizitaj grupoj kiel ŝtatoj ekestas aŭ pro disfalo de ankoraŭ pli grandaj ŝtatoj aŭ pro unuiĝado de kelkaj malpli grandaj. Tiu dua maniero havas du kaŭzojn. Aŭ pro konkerado de unu el la ŝtatoj (deviĝa unuiĝo) aŭ pro interkonsentita unuiĝado, kio estas malofta kaj nova fenomeno. Ni travivas ĝuste nun tian fenomenon en Eŭropo. Temas pri interkonsentita integriĝo baze de propravola unuiĝado en novan kvazaŭŝtaton, Eŭropan Union. En plimulto de landoj vivas plimulta popolo laŭ kiu oni kutime elektas la nomon de la ŝtato kaj la ĉefan (plej ofte ankaŭ la nuran) ŝtatan lingvon. En relative maloftaj okazoj de insulaj ŝtatoj vivas ununura popolo sen maplimultoj. Parolante pri Eŭropa Unio, oni devas konstati ke tiu estas aparte heterogena kun tre multaj popoloj kaj preskaŭ ĉiuj landoj en ĝi havas pli aŭ malpli da malplimultoj aŭ konsistas el kelkaj popoloj. Ĉu en tia komunaĵo entute eblas pensi pri komuna eŭropa identeco? Kompreneble jes. Kaj tio estas nenio nova. Similaj ŝtatoj ekzistis certan tempon en la plimulto de eŭropaj historiaj epokoj. Mi mencias nur kelkajn lastajn ekzemplojn. Aŭstrohungario estis unu el tiaj sukcesaj ŝtatoj, kiu sukcesis travivi kelkajn jarcentojn, kaj temis eĉ pri sukcesaj prosperaj jarcentoj por ĉiuj ene vivintaj popoloj. Preskaŭ tutan jarcenton ekzistis Sovetunio kaj Jugoslavio (se ni ne konsideras la mallongan interrompon dum la dua mondmilito). Tiuj ŝtatoj klopodis, kaj certgrade sukcesis, evoluigi komunan identecon por ŝtatanoj de tiom diversaj popoloj. Mi ne parolos pri la ŝtategoj kiaj Hindio (Bharato) aŭ Ĉinio kiuj same konsistas el granda nombro da popoloj kaj sukcese ekzistas jam dum jarmiloj. Aŭ pri relative nova ŝtato Indonezio, kiu konsistas el 17.000 insuloj kun miloj da popoloj kaj popoloj... Aparta rakonto rilatas al Afriko. La limojn de tieaj ŝtatoj difinis la ekskoloniaj ŝtatoj artefarite kaj ofte en tiuj ŝtatoj estas nenio komuna al pluraj popoloj kaj populgrupoj kaj tamen tiuj ŝtatoj ekzistas jam dum jardekoj kaj la registaroj klopodas evoluigi tutŝtatajn identecojn.

Se en iu heterogena ŝtato neniu provas evoluigi komunan identecon, tiu funkcios iom da tempo pro la perforto, kiu ĝin kunmetis. Plej ofte temas pri la perforto plenumata far potenco de la konkeranta popolo kaj pri ordo kiun en tia ŝtato certigas forta armeo kaj policaj unuoj. Alie ĝi rapide mortos. Estas ebla ankaŭ la potenco de ekonomia intereso. Mi konas nur unu tian ŝtaton: Svislandon, kiu ne sukcesis vere evoluigi ĝenerale komunan identecon sed kelkaj popoloj kunekzistas en ĝi dum pluraj jarcentoj sen ŝtata perforto. Sed temas pri iusenca ekonomia perforto, kiu kuntenas kune popolojn kiuj sin reciproke ne amas.

Eŭropa Unio estiĝadas tre laŭŝtupe kaj malrapide. Ankoraŭ ĝi ne estas verasence ŝtato, ankoraŭ ĉiam temas antaŭ ĉio pri komuna merkato kaj iuj elementoj de ŝtateco kaj nun ni troviĝas sur la vojkruciĝo. La granda ekonomia monda krizo efikas tre disige. Komunaĵo kiu ankoraŭ ne fariĝis ŝtato kaj entute ne havas komunan identecon estas en granda danĝero disfali. Ĉu tiu eksperimento post sesdeko da jaroj malsukcesos? Se ĝi tamen sukcesos saviĝi kaj eliri el la krizo kompleta, tio estos por ĝi gravega sperto, kiu postulas laŭeble rapidan starigon de ŝtato kun ĉiuj ŝtataj kvalitoj (mi kredas ke la nura ebla formo estas krei laŭkonstitucian federacian ŝtaton) kaj komenci eduki siajn civitanojn, aparte la junajn, por la komuna identeco.

Ĉi tie tuj aperas plia demando. Se ni evoluigos eŭropan identecon, ĉu ĝi damaĝos la ekzistantajn naciajn identecojn, kion ne permesas iu ajn el la popoloj. Tiu demando estas senkaŭza, se ni scias, ke ĉiu el ni normale posedas multajn identecojn samtempe kaj ke la nacia identeco estas nur unu el ili. Tio logike signifas ke per aldono de plia identeco ni perdas

neniun antaŭan, kiun ni ne deziras perdi. Tiu demando tamen ankoraŭ havas grandan influon rilate la politikan decidadon, ĉar ankoraŭ nuntempe en la lernejoj antaŭ ĉio oni zorgas nur pri nacia eduko elformiĝinta en la periodo de burĝa kapitalisma nacimerkata ideologio, kiam evoluis filozofio de nacia identeco kiel la ununura identeco. La homoj ankoraŭ lernas en lernejoj de Slovenio ke ili estas nur slovenoj, en Kroatio ke ili estas nur kroatoj, en Hungario ke ili estas nur hungaroj kaj ĉio alia estas malgrava. Kaj se ni kredas pri tio (kaj la plimulto ankoraŭ kredas, ĉar ja tio estas parto de ilia eduko), ni ege timos ke pro la evoluo de la eŭropa identeco ni damaĝas al la nacia identeco. Sed tio ne veras. Kompreneble sub la kondiĉo ke ni ne komprenu komunan identecon laŭ historia modelo kiam novaj supernaciaj identecoj estis perforte trudataj. Se ni dezirus enkonduki eŭropan identecon kiel la nuran identecon de Eŭropanoj kaj per ĝi efektive detruadi la naciajn identecojn, ni vere provus establi eŭropan imperion, pri kio multaj timas. Sed se ni eliras el la vero, ke EU estiĝadas surbaze de propravola memdecido de ĉiu popolo kaj ke ĝi efektivas novajn principojn de tolero kaj interkonsentado, tiam ni devas eliri el la supozo ke eblas evoluigi eŭropan identecon je la sama principo; ne kiel ununura identeco sed kiel unu plia identeco, do sur la principo de subsidiareco. Tiel ke novaj supernaciaj (tuteŭropaj) rajtoj eliras el interkonsento sur pli malsupra nivelo, sekve, ke la popoloj de Eŭropa Unio interkonsentu pri tio kiel ili komprenu eŭropan identecon kaj ke poste ili tian eŭropan identecon evoluigu per eduko de novaj generacioj en Eŭropa Unio. Kaj tiu eŭropa identeco devas apogiĝi sur ideologio eliranta el la jam pli-malpli akceptitaj eŭropaj valoroj.

Kiuj estas eŭropaj valoroj, valoroj kiujn jam akceptis ĉiuj ŝtatoj de la mondo aŭ tiuj kiuj estas rezulto de la evoluo de EU sed ne estas karakterizaj por konkretaj unuopaj naciaj valoroj? Asocio por Eŭropa Konscio en Maribor kunkolektis tiujn valorojn kaj mi resumas tion kion ni trovos sur la paĝaro de la Asocio: www.wix.com/dtislar/euopo. Unualoke estas sendube la »paco« kio ja ne estas karakteriza por unuopaj naciaj ŝtatoj, sekvas »homaj rajtoj«, kiujn almenaŭ laŭdeklare akceptis ĉiuj ŝtatoj de la mondo, poste sekvas »demokratio« kiel fundamenta formo de strukturigo de la ŝtatoj, kion ankaŭ akceptis ĉiuj ŝtatoj de la mondo, poste ni havas »socialajn rajtojn« kio estas grava valoro kiu en la nuna tempo en evoluantaj landoj perdas gravecon kaj EU devus esti fortikaĵo por defendi tiun valoron, kiu tre gravas por kompreni eŭropan komprenon de humaneco ĝenerale. Sekvas la ĝenerala principo de »solidareco«. En internaciaj rilatoj tio signifas reciprokan helpadon kaj mi opinias ke tio estas unu el la plej gravaj valoroj. Tiam ni havas »subsidiarecon« kiu estas rezulto de la evoluo de EU, nome principo laŭ kiu oni disdividas suverenecon tiel ke parton de suvereneco subaj unuoj post interkonsento inter si transdonas al la supra nivelo, sub la kondiĉoj kiujn difinas la suba nivelo. Do, kiom da suvereneco la naciaj ŝtatoj donos al organoj de Eŭropa Unio dependas de reciproka interkonsento de popoloj, sed ne de decidoj de EU. Plia valoro estas »unueco en diverseco«, kio ja estas slogano de EU kaj signifas, ke ni komprenas la diversecon de Eŭropo kiel valoron kaj ke la eŭropa bunteco kontribuas al ties sukceso. Sekvas »egalaj ŝancoj«, do malebligo de ĉiuj formoj de diskriminacio, kio ankoraŭ estas pli deziro ol realeco. La »daŭropova evoluo« estas same grava valoro, ĉar ĝi ja estas la ununura alternativo por normala estonta evoluo de la mondo. La posta valoro estas »tutviva lernado kaj scienco«. Verŝajne estas klare ke la sukceso de la homaro ĝenerale dependas de la scio, kiun ni havas. La antaŭlasta valoro estas sekulareco. En ŝtato kiu estas tiom diferenca kaj kunmetita el tiel diversaj popoloj apartenantaj al diversaj religioj, estus katastrofo ne konsideri la principon de sekulareco, do principon de diseco inter ŝtataj kaj religiaj institucioj. Oni devas lerni pri ĉiuj grandaj religioj kaj iliaj valoroj, evoluigi toleron inter ili sed neniu ni rajtas akcepti kiel ŝtatan kaj kun ŝtato ligitan religion. Kompreneble ankaŭ la nereligioj devas esti tiusence egalrajtaj civitanoj. La lasta valoro estas »respondeco pri Eŭropo kaj la mondo«. Ni ne povas havi rajtojn sen havi respondecojn.

Se tiuj valoroj estus elirpunkto por lerneja edukobjekto pri eŭropa konscio, oni povus evoluigi fieron de Eŭropanoj pro EU, ne nur pro nacio al kiu ili apartenas. Sen EU ni ne povas batali por la paco en la mondo, sen EU ni ne povas esti reciproke solidaraj, ni ne povas funkcii kadre de subsidiara politiko, sen EU ni ne povas esti sukcesaj sur la kampo de daŭropova evoluo, sen EU estas ankaŭ malfacile batali kontraŭ streboj de la plej fortaj religiaj institucioj, kiuj postulas eniron en la ĝeneralajn lernejojn kaj certajn antaŭrajtojn. Multajn vivgravajn celojn ni ne povas atingi, se ni ne komprenas ilin kiel eŭropaj valoroj kaj realigante ilin je tuteŭropa komuna nivelo.

Do en ĉiujn EU-lernejojn necesus enkonduki la lernobjekton »Eduko por eŭropa konscio« kiu baziĝus je 12 eŭropaj valoroj kaj evoluigus eŭropan konscion, fieron pro tio ke ni estas eŭropanoj kaj emocian ligan al EU.

Tie ĉi estiĝas la lasta grava demando. Kiel ni solvu la lingvan demandon? Mi jam klare diris ke la ĉefa simbolo de iu identeco estas lingvo. Ne temas pri lingvo kiel komunikilo. Por tio oni povas uzi kiun ajn lingvon aŭ kiujn ajn lingvojn (kiel ja nun estas en EU) sed – se ni deziras krei komunan identecon, ni devas havi lingvon, kiu reprezentas simbolismon de tiu nova identeco. Kiam mi parolos tiun lingvon, ĉiu tuj scios ke mi estas Eŭropano kaj per tiu lingvo mi montrados fieron pro mia aparteno al Eŭropa Unio. Kiam temas pri nova granda ŝtato konstruita per perforto (ekz. granda Rusio kiu poste transformiĝis al Sovetio), kutime oni trudas ankaŭ la lingvon de la konkeranto aŭ de la plej forta popolo en tiu grandŝtato kiel ŝtatan lingvon. Kaj tiu fariĝas por la elitoj de la konkeritaj popoloj trudita identeca lingvo de la komuna ŝtato, lingvo de prestiĝo, en tiu kazo la rusa. La samo okazis en eksaj kolonioj en Afriko, Azio, Ameriko kie oni trudis la anglan, francan, hispanan aŭ la portugalan. Kaj post kiam la koloniiganto foriras (ekz. angloj el Hindujo), tiu lingvo fariĝas liga neŭtrala lingvo kaj lingvo de komuna identeco. Tiel la angla iĝis identeca lingvo de multaj landoj sed kun etaj variaĵoj (la aŭstralia angla, la hinda angla, la niĝeria,,,) sed tamen sufiĉaj diferencigiloj fonetikaj kaj leksikaj por ke laŭ tiu lingvo oni tuj rekonu hindon, aŭstralianon aŭ niĝerianon. La samo okazis kun multaj variaĵoj de la hispana en Sudameriko ktp. Kion tio signifas? Komuna identeca lingvo en ŝtatoj kun miksita loĝantaro povas esti nur neŭtrala lingvo (kiu denaske ne apartenas al iu ajn el la loĝantoj de tiu lando), kaj se por tio oni transprenis lingvon de eksa koloniiganto, ili devas ĝin almenaŭ iom ŝanĝeti, ke laŭ tio ili diferencigis de ŝtatanoj de aliaj ŝtatoj. Kion ni faru en EU? La angla jam venkis kiel komunika lingvo. Ĉu ĝi iĝu ankaŭ identeca lingvo de EU, lingvo kiun ĉiu eŭropano sentus kiel sian krom la propra nacia lingvo? Bedaŭrinde tio ne eblas. La angla en Eŭropo jam estas identeca lingvo de britoj kaj irlandanoj, do, ĝi ne estas neŭtrala en Eŭropo. Tiu anglaĵo kiun ni uzas en la scienco kaj en ĝenerala internacia komunikado ne estas la brita, sed usona, do ĝi estas identeca lingvo de usonanoj. Kaj krome en Eŭropo ekzistas plia kondiĉo. Eŭropo kreskas baze de interkonsento, propra decido de ĉiu popolo kaj de subsidiaro. Ĉu ni trudu al ĝi la usonan lingvon pro tio ĉar temas pri lingvo kiun usonanoj per ekonomia perforto trudis al elitoj de preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo? EU devus tiun demandon solvi je neŭtrala kaj interkonsentita maniero. Por tio estas eblaj tri manieroj: elekti iun vivan lingvon, kiu en Eŭropo estas neŭtrala (ni diru la araban). Tion oni verŝajne ne povas fari ĉar en Eŭropo ni neniam havis komunan koloniiganton. Alia maniero estas elekti mortan lingvon sur kiu apogiĝas la eŭropa kulturo kaj historio kiel la latinan aŭ malnovgrekan. Tio estas ebla solvo. Ĝin elektis ekzemple israelanoj kiam ili fondis sian novan ŝtaton. La hebrea antaŭ la ekesto de Israelo estis morta lingvo kaj nuntempe ĝi tre vigle evoluas. Sed tiurilate ekzistas du problemoj: kiun el la du kandidatoj elekti kaj kial lerni sufiĉe malfacilan lingvon se jam la plimulto de la elito uzas relative simplan anglan lingvon? Sed ekzistas ankaŭ la tria eblo. Elekti neŭtralan kaj plane nove konceptitan lingvon baze de eŭropa historio, do baze de la latina kaj malnovgreka sed kiu estas simpla por lernado. Kiel

jam plurfoje dirite, necesas liberiĝi de la naciisma, burĝfilozofia antaŭjuĝo ke la naciaj lingvoj estas naturaj kaj ke plane produktitaj lingvoj estas artefaritaj. Ĉiuj normlingvoj estas artefaritaj kreaĵoj, kiujn normigis certaj homoj. Tian solvon elektis indonezianoj por sia ŝtato kaj nuntempe tio estas la plej forta lingvo de muzulmanoj kun 300 milionoj da parolantoj. Plane artefarite normigita lingvo. Ekzistas plurdeko da ĉefe insulaj landoj aparte an la Atlantika kaj Pacifika oceanoj, kiuj havas ŝtatlingvon kiu komence estis piĝino (artefarita simpligita mikslingvo, kiun kreis komercistoj). Kaj en Eŭropo ni jam havas tian lingvon kiu ekestis antaŭ 130 jaroj kaj dum tiu tempo elprovis sin sur ĉiuj kampoj de scienco, kulturo, teknologio kaj ĉiutaga vivo. Temas pri Esperanto. Guglo ĝin jam akceptis kiel unu el 64 plej gravaj lingvoj en la mondo kaj havas ankaŭ por ĝi sian tradukmaŝinon, en la vikipedio en Esperanto jam estas 250 mil artikoloj kio metas ĝin inter 40 plej fortaj lingvoj de vikipedio. Oni taksas ke ĝin certgrade uzas ĉirkaŭ du milionoj da homoj, plej multe en Eŭropo. Kaj ĝi apartenas al neniuj popolo ĉar nun tio estas lingvo de volontuloj, kiuj ĝin lernis pro la propra deziro. Tial ĝi estas internacie neŭtrala. Pro sia strukturo oni povas ĝin tre rapide ellerni. Tio sendube estus la plej bona solvo, se ni ne havus tre potencon malamikon de tiu solvo. Tio estas anglo-usona koalicio kiu plu agas por disvastigi sian solvon kune kun elitoj de multegaj landoj por ankaŭ lingve regi en la mondo.

Por kompreni kio okazas mi montros per la ekzemplo de la irlandaj lingvoj. La irlandaj lingvoj estas la plej malnova literatura lingvo en Eŭropo (se ni ne konsideras grandajn lingvojn de malnovaj imperioj nun ne plu ekzistantaj). La unuan dokumenton en la irlandaj lingvoj ni havas jam en la 6-a jarcento, 100 jarojn antaŭ unua dokumento en la angla. Tiu lingvo normale evoluis ĝis la mezo de la 19-a jarcento. Britoj konkeris la irlandan insulon en la 12-a jarcento sed ĝis la 18-a jarcento tio ne influis al la uzo de la irlandaj lingvoj. En la 18-a jarcento oni enkondukis devigan edukon en lernejoj. En la lernejoj oni uzis ankaŭ la irlandan sed la enhavo de la edukado celis ekskluzive evoluigon de la brita identeco. Oni lernis nur pri la brita historio, pri la graveco de la granda brita imperio, ĉion pri britaj reĝoj, brita literaturo, kulturo... Tia lerneja sistemo ne detruis la irlandan lingvon, kaj ĝi ankaŭ ne estis malpermesita, sed ili tre sukcese detruis la irlandan identecon ĉe la irlandaj elitoj kiu lernis en tiuj lernejoj. Kaj tiam la definitivajn finoj aranĝis la naturo. Inter la jaroj 1845 kaj 1849 iu insekto detruis la kompletan terpon sematan de kiu la popolo vivis. Tial pro malsato mortis pli ol miliono da irlandanoj kaj plia miliono elmigris. Kiu travivis ĉi tiun periodon de malsato? Tiuj kiuj estis en la servo de la brita ŝtato, tiuj havis pli da mono kaj parolis la anglan. Mortis nur simplaj irlandanoj en la vilaĝoj parolintaj ekskluzive la irlandan. Pro tio la irlandanoj mem komencis kredi ke eĉ Dio estas anglo kaj ke paroli la irlandan signifas decidiĝi por malbona estonto. La irlandaj gepatroj decidis malpermesi paroli la irlandan al siaj infanoj kaj batis ilin pro tio. En la postaj tridek jaroj estis la tempo de silento. Fine de la 19-a jarcento neniuj krom eta kvanto da foraj vilaĝanoj sciis la irlandan lingvon. Kiam en 1922 estiĝis sendependa Irlanda ŝtato, oni tuj enkondukis devigan lernadon de la irlandaj lingvoj dum 12 jaroj. Kiaj estas la rezultoj? Nuntempe mapli ol 30% de la irlandanoj komprenas la irlandan, 15% ĝin kapablas certgrade paroli kaj nur 2% uzas ĝin en la familia vivo ĉiutage. Konkludo: La angloj ne malpermesis la irlandan lingvon kaj ne perforte detruis la lingvon. Tion faris la irlandanoj mem, sed nur post tio, kiam ilia elito en la lernejoj pro eduko por la brita konscio perdis la propran irlandan identecon kaj iĝis konvinkita ke la lingvo de prestiĝo estas la angla.

Kaj la sama afero okazas al ni ĉiuj nuntempe. La anglo-usona potenco antaŭ ĉio pere de tre evoluinta propagando, filmoj, modernaj medioj kaj edukado sukcesis en la plimulto de eŭropaj popoloj, esence ĉe iliaj elitoj atingi la perdono de la nacia identeco. La usona percepto de la mondo, pensmaniero, usonaj idealoj, ekonomia sistemo, mono kaj profito kiel superaj usonaj dioj fariĝis idealoj de eŭropaj elitoj. „Ni ne plu bezonas tiujn etajn vilaĝanojn

lingvojn“. Ĉiam pli da postuloj ekzistas ke en neanglaj universitatoj oni forigu prelegojn en naciaj lingvoj kaj enkonduku prelegojn nur en la angla (iom da tiaj provoj jam estis en Italio kaj pluraj aliaj landoj). Usonanoj ne atakis kaj ne per armiloj forigis niajn lingvojn, sed per modernaj informrimedoj ili sukcesis detrui naciajn identecojn ĉe elitoj kaj nun restas nur la lasta paŝo por fine perdi la naciajn lingvojn. Mi ne diros ke ĉe ni estos same kiel ĉe irlandanoj, sed per la enkonduko de la angla en ĉiujn instituciojn kaj lernejojn kreskos la konvinko ĉe la popolo ke nur la angla portas prestiĝon kaj belan estonton. Pro tio la naciaj lingvoj restos duarangaj, ĉar ili ne plu estos uzataj en universitatoj, en la scienco kaj malrapide ili malaperos ankaŭ el mezaj lernejoj kaj ŝtataj servoj.

Se ni ne tre baldaŭ komencos konsciiĝi ke rilate la perdon de la naciaj identecoj en Eŭropo ni jam estas en antaŭinfarkta stato kaj se ni ne decidus enkonduki edukadon por eŭropa identeco kaj eŭropan lingvon kiu ekzistos paralele kun la naciaj lingvoj kaj tiel certigos egalrajtecon por ĉiuj naciaj lingvoj en eŭropaj institucioj, ni baldaŭ havos la staton kian nun havas la irlanda popolo.

Zlatko Tišljariĉ

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 30-an de septembro 2018

Redaktoro: Zlatko Tišljariĉ

En la numero kunlaboris: Seán Ó Riain, Zlatko Tišljariĉ, Liba Gabalda. Radojica Petković, LKK de Itala E-kongreso

Kontakto: ztisljariĉ (ĉe) gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno>

